

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2000:2



Sur elefanta dorso en Nepalo

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Majo 2000 • 88-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion:

Jan Setréus
Janko Luin (layout)

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: HA Reklamtryck, Stockholm

Prenumeration 2000: 180 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: sef@esperanto.se
www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2000:

Direktansluten medlem 180 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 90 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 270 kr (Inkl. 1 ex. av *La Espero*. Tilläggsex. kostar 90 kr).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Hemsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som EsperantoCentro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Bertil Nilsson

Manusstopp den 25/5

Manus till *La Espero*

sänds till Jan Setréus

Mörtg. 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden

(tel./fax 08 - 717 75 67

e-post jan.setreus@spray.se)

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

Jan Strönne

Jan Strönne mortis. Unu el la plej aktivaj esperantistoj en Svedio, eble la plej aktiva el ili. Li fariĝis 88-jara en januaro kaj li mortis la 7-an de marto, lasante la edzinon Anna-Greta kaj filinojn Ulla Luin kaj Ann-Marie Strönne kun familioj en funebro. Mul-

taj malnovaj amikoj esperantistoj venis al la funebra ceremonio, kaj la multaj floroj montris ke Jan Strönne estis ŝatata persono.

Jan Strönne naskiĝis en Malmö kaj li fariĝis bankisto ĉe Riksbanken en Malmö post studenta ekzameniĝo 1931. Pli poste li ricevis la titolon riksbankskammer.

Esperantiĝo

En la tridekaj jaroj li venis en kontakto kun Esperanto kaj rapide lernis. Li komencis gvidi kursojn kaj post nelonge li fariĝis prezidanto de la klubo en Malmö.

1948 estis grava jaro por la aktiva klubo kaj precipe por Jan Strönne, ĉar en tiu jaro li gvidis la laborgrupon por la Universala Kongreso en Malmö. Li en sama jaro fariĝis prezidanto de SEF kaj poste restis sur tiu posteno dum 30 jaroj. Frostavallen en Skanio fariĝis konata en la kvindekaj jaroj pro liaj internaciaj konferencoj kiujn li tie aranĝis. Konsekvence lia nomo fariĝis konata ekster la svedaj limoj kaj iom post iom li aperis inter la honoraj membroj de UEA (1991).

Kiam li ne okupiĝis pri Esperanto - esperantistoj kutime havas plurajn interesojn - li dediĉis iom da tempo por astronomio kaj numismatiko. Li ankaŭ interesiĝis pri scienco kaj demandoj pri paco. En la komunumo Malmö li jam en juna aĝo estis politike aktiva en Folkpartiet.

Bona memoro

Mi mem havas bonan memoron pri Jan Strönne kiam mi kiel juna viro partoprenis mian unuan SEF-kongreson en iu frua kvindeka jaro. Mi venis iom malfrue al la bankedo. Proksime de la honora tablo mi ĉirkaŭrigardis por trovi sidlokon ie en la salono. Tiam iu meze de la honora tablo komprenis mian problemon, Jan Strönne, kaj li montris al libera seĝo apud si.

En tiu momento mi ne povis imagi al mi, ke mi mem povus fariĝi prezidanto de SEF. Tio tamen okazis 1978 en Uppsala. Strönne restis ankoraŭ unu jaron en la estraro, tiam kiel vicprezidanto.

La nomo Strönne malaperis el la estraro post 31 aktivaj jaroj, sed ne tute... La filino Ulla, kun familia nomo Luin, jam troviĝis en la estraro de kelkaj jaroj. Mi ne dubas ke Jan Strönne estis fiera pri sia filino Ulla, same kiel li havis kaŭzon esti fiera pri sia nepo Janko, kiu jam kelkajn jarojn aktivis en la SEJU-estraro.

Roland Lindblom



SEJU:s STYRELSE

Ordförande:

Lovisa Gustafsson, Slättevalla,
Nolgården 1, 540 66 Sjötorp,
miaujo@hotmail.com

Vice ordförande:

Janko Luin, Myggdalsv. 123, 135 42
Tyresö, tel. 08-7128291,
janko@luin.nu

Kassör:

Silvia Man, Studentbacken 23 5tr/
520, 115 57 Stockholm,
silvia.man@spray.se

Vice kassör:

Fredrik Olofsson, Idrottsv. 19B, 461 40
Trollhättan, tel. 0520-10656,
fredrik@esperanto.se

Sekreterare:

Jessica Hanmeier, Vindög. 37, 257 33
Rydebäck, jessica@esperanto.se

Vice sekreterare:

Torun Jansson, Döbelnsg. 24 C, 752 37
Uppsala, 018-545 234,
torun@deimos.mnf.nu

Ledamot:

Anna-Lena Eriksson, Harald Stakeg.
20, 415 01 Göteborg,
tel. 031-256461,
anna-lena.eriksson@telia.com

Suppleanter:

Håkan Lundberg, Fisksåtra Torg 12 4
tr, 133 41 Saltsjöbaden,
tel. 08-7177869,
hokan.lundberg@telia.com

Keiko Snarberg, Brilljantg. 12, 421 49
Västra Frölunda, tel. 031-7090039,
keiko@esperanto.nu

Esperanto@Interreto-2000 plaĉis

La seminarisemajno de E@I-2000 (elparoliĝas "E ĉe I 2000") jam forpasis, kaj eblas konstati ke 'la fortoj' bele estis kun ni dum la aranĝo!


Dum la tuta semajno estis bona kaj amika etoso inter la 21 partoprenantoj de Pollando, Litovio, Svedio, Rusio, Danlando kaj Norvegio. Spertigis ilin pri interretaĵoj kelkaj de la plej interesaj prelegantoj en Esperantio.

Bertilo Wennergren prelegis pri HTML, UniRed (redaktilo) kaj Signokodoj. Franko Luin rakontis pri siaj spertoj de *esperanto.se* kaj *esperanto.nu*. Henning von Rosen prelegis pri la rilato inter homaj lingvoj kaj komputilaj lingvoj. Ralf Frölich gvidis diskuton pri strategioj por Interreto kaj Fredrik Marcus de Razorfish montris kiel la estonteco de Interreto povus aspekti.

Pro la subteno de inter alie Ungdomsstyrelsen kaj Razorfish, eblis havi la seminarion ĉe Tollare Folkhögskola, belega loko 20 minutoj for de la centro de Stokholmo.

Dum la seminario ni diskutis kiel daŭrigi la laboron. Estis decidite ke ankaŭ venontjare ni okazigos similan aranĝon, verŝajne kun fokuso je iu speciala temo kadre de Interreto kaj Esperanto.

Håkan Lundberg



La partoprenantoj diligente komputilumis...

Foto: Janko Luin

KONGRESA PROGRAMO

**Esperanto-kongreso en Helsingborg
20 - 21 majo 2000**

Vendrede

Lokalo estos je dispono en la vespero ekde 18.00. Senprograme, nur por antaŭkongresa babilado.

Sabate

9.00 Akceptejo ekfunkcias en Olympiaskolan.
12.00 Lunĉo. Por mendintoj.
13.00 Inaŭguro. Temo: Esperanto en gimnazioj.
14.00 Jarkunsido por SEF
15.30 Kafpaŭzo
16.00 Prelego de Kalle Kniivilä (membro de UEA-estraro).
17.00 Pri libroj.
18.30 Komuna tagmanĝo. Por mendintoj.
19.45 La muzika grupo el Litovio, ASORTI, plezurigos vin.
Varia programo.

Dimanĉe

8.30 Diservo, aranĝe de KELI
9.00 Jarkunsido de Eldona Societo/Esperantoförlaget.
9.40 Pri gimnaziaj kursoj. Laborgrupoj prezentas sin.
11.00 Kafpaŭzo.
11.30 Kon povos kluboj fari por stimuli gimnaziojn komenci instrui esperanton?
13.00 Lunĉo.
Ekskurso poste al Danlando, ekspoziciejo Louisiana.

Ĉiuj programeroj okazas en Olympiaskolan, kiu situas je Södra Stenbocksgatan 75 en Helsingborg.



...kaj ĝuis la belegan naturon ĉe Tollare Folkhögskola.

Foto: Håkan Lundberg

La tria Internacia Himalaja Renkonto 2000 en Nepalo

Ĝin partoprenis 46 palaj kaj 20 ne-palaj samideanoj. La paluloj venis el la Skandinavaj landoj (7 el Svedio), Germanio, Belgio, Hungario, Italio Japanio kaj Barato (tiu ulo fakte estas nepala kaj najbaro). Estis granda nombro kompare kun la du antaŭaj fojoj.

La celo de la renkonto: La Nepalanoj mem ne havas la samajn eblecojn vojaĝi eksterlanden por partopreni esperantistajn renkontojn. Tial NEESPA (Nepala Esperanto Asocio) organizas tiujn renkontojn por logi nin al tiu tre unika "miniatura Azio" por gustumi kun ni la esperantistan etoson kaj la landon el diversaj vidpunktoj.

Ili vere sukcesis kune kun ni krei tiun unikan harmonion. Dank'al ilia bona organizado kaj la aliaj pagkondiĉoj ol ĉe ni (pagi surloke: neniu fakturoj kaj kromaj kostoj), ĉio iris glate laŭ mia impresoj.

Tri regionoj

Ni vizitis 3 malsamajn regionojn de Nepalo laŭ la itinero Katmandu - Pokhara per 2 busoj, de tie al Jomsom per flugmaŝinetoj, de tie al Muktinath piede kaj reen. De Jomsom sammaniere al Pokhara kaj reen buse al Katmandu.

En Katmandu ni loĝis en kvarstela hotelo al kiu ni revenis post la vojaĝo al la Himalaja montaro kaj al alia hoteleto en Nagar Kot en la proksimeco de Katmandu. Tiuj hoteletoj havis eble unu stelon aŭ eĉ ne duonon. Do, estis tre bone reveni al tiu unua ranga hotelo, kie ni sentis nin bonvenaj kaj havis eblecon bani nin kaj bone dormi.

Je la alvenvespero en nia hotelo en Pokhara ni estis regalataj al bona kaj gaja prezentado de Nepalaj popoldancoj kaj muziko. Ĉiuj tre volonte volis denove travivi tiun etoson je la reveno en Pokhara, sed tio ne povis okazi laŭ la onta tialo. Pokhara ni nur vizitis duontage pro la fakto ke la malbona vetero nuligis la trafikon de

Jomsom al Pokhara.

Pro tio ni estis kvar tagojn en la tria regiono kiu situas en la mezo de la Himalaja montaro en la regiono de Mustang. Nia deir- kaj revenhotelo situis en la centra komunumo Jomsom. De tie la plej multaj piediris al pli pitoreska Kagbeni kaj la postan tagon al la 1000 metrojn pli alten situanta Muktinath. Tie la panoramo estis grandioza, sed la temperaturo tre malvarme. Kelkaj restis en Jomsom aŭ revenis de Kagbeni ne kuraĝante la grimpadon kaj la pli longan iradon al Jomsom.

Blinda finna samideano Heikki Kosonen sen problemoj kun helpo de sia edzino Aili plenumis ĉiujn lacigaĵojn. Li diris poste "Jes, estis iom ŝtonplena".

Mi eĉ luis ĉevaleton kun gvidanto. Mi havas la plej bonajn memorojn de tiu dezerta pejzaĝo malgraŭ ke mi ne atingis la celon Muktinath. Ni ne estis ricevintaj la informojn pri la malfacilaĵoj. Eble la organizantoj ankaŭ ne sciis ilin.


Flugmaŝinoj

En ambaŭ direktoj ni estis transportitaj en flugmaŝinetoj po 20 personoj dum 20 minutoj. La rekta distanco estas ĉ. 40 km de Pokhara kaj la altecdiferenco 1.800 m. Ne troviĝas aŭtovojo. La dua alternativo atingi Jomsom estas piediri dum ĉ. 9 tagoj aŭ ludi ĉevaleton.

En Pokhara ni vizitis diversajn vidindaĵojn sed malpli ol planita pro atendado en Jomsom (sed ni vere "uzis" la tempon tie per spontana amuzo kultura programo de la partoprenantoj).

Alia interesa travivaĵo por multaj okazis dum la vojaĝo inter Katmandu kaj Pokhara kiu estis torentveturado per gumaj remboatetoj sur la Triŝuli rivero. Ni mem devis remi tra la torentoj kiam la boatestro tion ordonis. Ili kiuj ne kuraĝis aŭ ne volis malsekiĝi faris intertempe ekskurson al templo tre alten situanta per telfero.

Reveninta en Katmandu, ni nur dormis en nia bona hotelo unu nokton, ĉar la venontan nokton ni tra-



noktis en Nagar Kot, kiu situas ne longe for de Katmandu por frumatene je la 06.40 rigardi la sunleviĝon super la Himalaja montaro.

La tagon antaŭe ni vizitis la malnovan reĝan ĉefurbon Bhaktapur, kiu konservas tre bone la mezepokan karakteron malgraŭ tertremo antaŭ nur 12 jaroj.

La lastan vesperon denove en nia hejmo en Katmandu, ni ricevis la "atestilon" pri nia partopreno al la renkonto dum grava kunveno kun altranguloj en la Nepala socio. Kunveno kiu signifas multe por NESPA.

Antaŭe ni ricevis diversajn aliajn donacojn. Speciale la tipe Nepala jako estis tre konvena kontraŭ la malvarmo en la malvarmo en la montaro.

Almozpetantoj

Kiam ni komence vizitis la vidindaĵojn amase, ni estis ĉenitaj de ĉiuj kiuj ĉirkaŭis nin por vendi kion ajn aŭ petis almozojn. Post kelkaj tagoj ni ĉiuj havis diversajn "metodojn" kondukti speciale kun infanoj. Fakte estis ĉarme marĉandi kun ili kaj iĝi feliĉaj ke ni ion interesan aĉetis, io, kion vi antaŭe ne intencis aĉeti. En Jomsom ni povis pli "libere" promeni, kio sentis bone malgraŭ la forta malvarma vento.

Wim Posthuma



Försvar för klubbarna

Då och då har det främst bland nya medlemmar, skämtats litet om det sekteristiska i esperantorörelsen. Yngre eller nyare medlemmar menar att det har handlat om att sitta i olika källarlokalerna och skramla med kaffekoppar och ha konversationsmöten med allsång till olika gitarrtrubadurer. Plus ljusbilder från olika sammankomster runt om i världen.

På sin tid bildades i Stockholm en motrörelse mot detta av ungdomar som "bröt sig ut" och bildade eget, La Ranetoj (Grodorna) kallade man sig. Dessa grodor gav bland annat också ut en uppmärksammas lärobok med nästan samma namn, en bok med för sin tid ganska häftiga texter som tilltalade ungdomen. I sina stadgar hade man bland annat förbud mot diabilder och det var radikalt på den tiden.

Men eftersom tiden gick blev även dessa ungdomar "gamla" som vi alla blir om vi får leva av hälsan, och mycket mer har man inte hört om grodornas verksamhet, mer än att dessa medelålders människor numera träffas en gång i månaden och spisar middag hemma hos varandra och det är ju också trevligt.

Ovanstående exempel har säkert

fyllt en viktig funktion i olika medlemmars sociala liv. Det har varit berikande och man har hållit språket vid liv och med tiden blivit skickliga esperantister.

Men belyst i historiskt perspektiv kan man fråga sig om man kunnat gjort så mycket annorlunda. Det är alltid lätt att vara efterklok när man sitter med facit i hand. Det är lätt att kritisera och även konstatera att man glömt bort ungdomen och i vissa fall även motarbetat denna. Ingen nämnd och ingen glömd.

Men vad som främst skiljer då från nu, är att i dagens informationssamhälle har vi fått en ny teknik med datorer som varje mans egendom (och varje kvinnas med för den delen.)

Vi kan idag snabbare kommunicera med hela världen, hemma från våra vardagsrum. Man talar om nya fenomen som fiberoptik och bredband. Det kommer ständigt nya ord och förteelser, och snabbt går det hela tiden. Det är som i finansvärlden där tröjorna har gjort sitt intåg bland kavajerna. Unga miljardärer i jympaskor håller föredrag om IT för äldre herrar i slips och kavaj.

Men esperantorörelsen som blev spådd undergång med den nya tekni-

ken, tycks väl ha anpassat sig och följt med i utvecklingen.

Därför är det rörande när man hör att 80-90 åringar skaffar sig datorer och försöker hänga med i utvecklingen.

Idag kan vi konstatera att vi har medvind i seglen även om det inte direkt avspeglar sig i medlemsutvecklingen så tyder mycket på att esperantokonsumenterna blir flera. Det säljs böcker och svaras på frågor. Nya produkter kommer ständigt, inte minst från vårt stora grannland i öster nämligen Ryssland.

Men hade detta varit möjligt utan våra gamla klubbar med deras erfarenhet och uthållighet. Gammal är ju ändå äldst och trägen vinner som ordspråket säger.

Nu gäller det att samsas och lära av varandra för att möta en ny efterfrågan av ständigt nya människor. Kaisa Hansen menar att vi nu ska in på varje gymnasium och jag vill gå steget längre och arbeta för att vi ska in på universitet och högskolor för att skapa en adekvat lärarutbildning för blivande esperantolärare fullt jämförbar med vilken språkläraryrkesutbildning som helst.

Ëel Randehed

Om planerade språk

Roland Larsson i Enskede i Stockholm läste en artikel i Arbetaren med rubriken Drömmen om ett världsspråk som inte är engelska. En amatörforskare i språk skriver om volapük, ido, esperanto, occidental, novial, mondial, interlingua och unitario. Larsson lämnar i en insändare sin reaktion.

Jag läste med intresse Rune Thorsells artikel om några olika planerade språk. Jag tycker mig dock kunna konstatera att den icke redan initierade läsaren lämnas i sticket och inte får någon bra bild av vilken livaktig esperantorörelse som faktiskt existerar ... Det finns många världsomspännande kontaktnät som använder sig av esperanto för att kommunicera om de mest skiftande ämnen. Många ungdomar lär sig esperanto och reser

runt i världen och får många intressanta kontakter genom esperantorörelsen. Det utkommer ständigt ny litteratur på esperanto ... På några ställen i Sverige finns nu vissa möjligheter att inom ramen för det ordinarie skolväsendet lära sig esperanto ... Karlskoga folkhögskola bedriver sedan många år esperantoundervisning för elever från Sverige och andra länder ...

Att tro att det utvidgade EU i praktiken skall kunna fungera med översättningar och tolkning mellan alla medlemsländers språk får nog anses vara naivt. Kostnaderna blir enorma liksom antalet översättare och tolkar. Istället för att tvinga alla EU-medborgare att lära sig komplicerade nationella språk som engelska, franska, tyska o.s.v. borde man enas om att

använda esperanto som brospråk ... Om sedan EU-länderna införde esperanto som första, och kanske enda obligatoriska, främmande språk i skolorna så skulle vi inom överskådlig framtid kunna ha en välfungerande språkgemenskap i hela Europa. Språkets logiska uppbyggnad och sinnrika ordbildning gör det också lättare att lära sig även för ickeeuropéer än de stora nationella språken. Esperanto utgör heller inget hot mot de små nationella språken, vilka ju nu faktiskt riskerar att ätas upp av engelskan eller förvandlas till egendomliga blandspråk, "svengelska" är ett exempel. Mycket mer kunde sägas men detta kanske räcker som reaktion på Arbetarens "doftlösa" artikel.

Roland Larsson

Esperanto-information i Lesjöfors

Under Föreningen Nordens demokratiseminarium mot främlingsfientlighet och rasism hade Lars Forsman en 10 min inledning. Sedan fick de deltagande 58 gymnasisterna och lärarna från Sverige, Norge och Finland en 40-min lektion i två grupper. Intresset var stort och många sökte information om vidare studier. ... Ledarna från Föreningen Norden visade intresse och vi kan kanske hoppas på ett framtida samarbete.

Anita Dagmarsdotter
(Ur Esperantnytt)

Det är som lego

Med rubriken "Språket som får världen att öppna sig" skriver journalisten **Jeaninne Bergman** i Helsingborgs Dagblad den 13/1 om esperanto och undervisningen i språket på Olympiaskolan i Helsingborg. Ett 20-tal elever har läst esperanto en termin där.

Ordinarie läraren Kjell Randehed var sjuk vid avslutningen och ersattes av Anna-Lena Eriksson. Hon hade själv lärt sig språket som 15-åring och erfarit hur hon kunnat diskutera med folk från andra länder med andra uppfattningar. Hon har kunnat bo gratis hos esperantister i andra länder när hon varit på resa. "Folk är så glada och hjälpsamma när man kommer, säger Anna-Lena ..."

Olika grunder

Eleverna på skolan har olika bevekelsegrunder för sitt ämnesval. "Frida blev inspirerad av sin farmor som läste det när hon var ung. Waillon läser redan många språk och tyckte att det

Esperantoklassen vid Olympiaskolan i januari 2000



var roligt prova ett till. Malena har dyslexi och språkets stavningsregler är tydliga och Anna valde esperanto för att det är annorlunda.

En sak är de överens om – esperanto är lättare än alla andra språk de har läst ... Waillon Le har en bra liknelse till hands.

- Det är som lego. Allt är logiskt och går att sätta ihop, säger han."

Eleverna kommer att låta esperanton vila nu, men alla tror att de kommer att ha nytta av den längre fram.

Svenska esperantister på planeringsmöte

De svenska esperantisterna samlades under veckoslutet 25-26 mars på ett planeringsmöte i Jönköping för att förutsättningslöst diskutera nya trender och prioriteringar. Fokuseringen var på gymnasieundervisning där nya möjligheter öppnat sig. Man kommer att göra nya ansträngningar för att få igång utbildning av lärare och stötta de lärare som vill få igång esperantokurser på sina skolor. Organisationsfrågor och konkreta förslag om informationsåtgärder var också föremål för diskussionerna.

Franko Luin

Esperantokurser por enmigrintoj

Nia aktiva membro Ali Khoshmash-raban nun gvidas du kursojn por komencantoj, unu en Esperanto-Centro merkrede kun kvin lernantoj, kaj unu ĉe Integrationscentrum för Kvinnor en Biskopsgården (nordokcidenta urboparto de Gotenburgo) vendrede kun 12 lernantoj. La vendreda kurso konsistas nur el irananoj, plejparte virinoj. Integrationscentrum för Kvinnor (Integriga centro por virinoj) estas organizo starigita de enmigrintoj por faciligi la partoprenon de enmigrintaj virinoj en la sveda socio. I.a. la centro ofertas kursojn pri multaj temoj, i.a. la persa, la araba, kaj kompreneble la sveda. La E-kurso de Ali

estas nun parto de tiu kursaro. Li klarigas gramatikojn k.a. en la persa. Estas planite organizi alian studrondon por enmigrintoj kun alia gepatra lingvo ol la persa.

Ali Khoshmashraban ankaŭ prelegis pri Esperanto en la perslingvaj elsendoj de la Gotenburga proksimradio (loka radio organizita de diversaj societoj kaj asocioj). La unua prelego kolektis multajn el liaj nunaj kursoj. Li planas pliajn prelegojn por perslingvanoj.

Christer Lörnemark
(El Inter-ligilo 1/00)

Lingva seminario la 11-12-an de marto



Denove, post du jaroj, ni havis la plezuron dungi Nata Bertse kiel gvidantino por lingva seminario, kaj pli ol dudek personoj aliĝis. Ni diligente laboris sabate de la 12:a horo ĝis la 17:a, sed danke al la humora kaj malrigida maniero de nia gvidantino ni ne laciĝis. Ni moligis niajn cerbojn pere de substantivoj, kaj poste ni rakontis pri ni mem, intervjuis la najbaron, priskribis bestojn, kreis vortojn el la literoj en unu longa vorto kaj skribis poemojn.

De tempo al tempo ni kantis specialan kanton kreitan por Esperantogården. Ni eĉ ĉasis nekonatajn vortojn en PIV, (tio ja ne estas malfacila tasko) kiujn ni devis klarigi por la gekursanoj. Sabatvespere ni havis gajan kunestadon kune kun la malmö-anoj.

Nata kantis por ni kaj kantigis nin, Bertil aranĝis divenludon helpe de sonbendoj kun diversaj konataj esperantaj voĉoj, i.a. tiu de Zamenhof, kaj ni manĝis bongustan mangajon. La seminario daŭrigis dum du horoj dimanĉe, kaj post la fino ni certe ĉiuj sentis, ke ni estas iomete pli bonaj esperantistoj.

Lisbet Andreasson

Buntaj novaĵoj el Afriko

KORESPONDADO

Polo kiu kolektas poŝtstampojn sur kovertoj aŭ poŝtkartoj, uzitaj okaze de Esperantaj kongresoj k.s. volas kontaktiĝi kun svedoj kun la sama hobia. Li jam tridek ses jarojn kolektas, kaj sian kolekton jam multfoje ekspoziciis en Pollando kaj eksterlande. Havante multajn duoblaĵojn li volonte interŝanĝos.

Janusz Mikulski
ul. Zoknierska 11A/
46
10-558 Olsztyn
Pollando

Gbeglo Koffi, respondeculo pri Afrika Agado de UEA por ekkoni la eblojn de sia tasko kontaktis afrikajn landajn asociojn, klubojn, unuopajn personojn.

En **Angolo** Kabinda E-asocio suferas pro diversaj problemoj. Sed laŭ mia kono, ili estas solveblaj.

La prezidanto de **Benina** E-asocio parolis pri la nefunkciado de tiu asocio. Beninano Jean Codjo kun helpo de germanoj starigos reprezentantejon de Esperanto.

En **Ganao** la problemojn de la tiulanda asocio Zamenhofa Klubo verŝajne solvos la subteno (100 NLG) de Fondajo Afriko.

Mi informiĝis pri konfliktoj inter la Esperantistoj en **Kamerunio**.

Kongolanda Esperanto-Rondo ŝatus uzi Esperanton por praktikaj celoj: disvolvo de komerco, perfektigo de metiistoj, ktp. Multas altnivelaj esperantistoj en Demokratia Kongolando. Antoine gvidas kursojn en Kotdivuaro, kaj ŝatus, ke okazu internaciaj ekzamenoj en tiu lando.

En **Malagasio** estas nun du landaj Asocioj MEU kaj MEA. UEA rekonas nur la asocion MEU, kiu estas la tegmenta asocio en la lando. Estus bone, ke unusola ekzistu en ĉiu lando, kaj sub tiu estu la kluboj kaj aliaj grupoj esperantistaj.

Pri **Niĝeria** Esperanto-Federecio, NEF nenio scieblas. Estas malfacila kontakti iun ajn en ĉi tiu lando. Oni ne povas taksu la forton de NEF. Notindas, ke UEA jam donis subvencion al NEF, ke la asocio rekonigu sin ĉe la enlandaj aŭtoritatuloj, la rezulto ne scieblas.

En **Senegalio** Dakara E-klubo funkcias bone. La asocio havas financajn problemojn sed ili de tempo al tempo solvadas tion.

La E-asocio en **Sudafriko** funkcias bone, kvankam la membroj estas malmultaj. Ĝi ŝatus organizi la kvinan Afrikan Kongreson.

Rimarkindas la rilatoj de **tanzani**anoj kun sveda klubo, kiu helpas al niaj amikoj en fabrikado de sunkuiriĵoj. La homoj de la funkciula komitato havas aliajn projektojn, kiuj ebligas al la grupo gajni iom da mono.

En **Togolando** ĝenerale ĉio iras glate. La asocio ĵus okazigis sian sesan naciĉan kongreson, kaj pretiĝas por la sepa. Ĝiaj problemoj temas pri mono, ĉar ankaŭ tiun asocion ĝenas

la problemoj pri nekotizado de la membroj. Ne nur la memstareco en la organizado de la laboroj gravas, sed ankaŭ kaj precipe la financa.

Resumo

Multas bonnivelaj esperantistoj en Afriko, sed konfliktoj iel fuŝas la laborojn en multaj landoj. Escepte de EASA (Esperanto-Asocio en Sudafriko), aliaj landaj asocioj ricevas subvencion de UEA. Tiuj pensas, ke la elekto de afrikano sine de la estraro de UEA altigos la subvencion, kaj ebligas al afrikanoj fari ĉion ajn pere de Esperanto. Ni revenigu nin al la realo: "UEA ne asignas buĝeton al ĉiu estrarano, ke tiu ĉi laboru. Estraranoj proponas, kaj CO disponas". Tiel la politiko de UEA pri Afriko ĉiam estas sama kiel en pasintaj jaroj. Nun ni afrikanoj mem devas ion fari por montri, ke elekto de afrikano helpas al UEA: strebado al memstarigo de afrikaj landaj asocioj estas unua paŝo.

Gbeglo Koffi
esp.togo@cafe.tg

Pli ol 1000 gastigantoj en Pasporta Servo

La plej fama servo de TEJO, Pasporta Servo, spertis 14-procentan kreskon en unu jaro. La ĵus aperinta listo de gastigantoj enhavas 1.075 adresojn en 76 landoj. En 1999 la libreto nombri 945 adresojn. Plej multe da gastigantoj (91) estas en Rusio, dum geografie la reto estas plej densa en Francio kun 61 lokoj. La vera metropolo de Pasporta Servo estas Multan en Pakistano, kie 17 gastigantoj atendas vizitantojn.

En la bele presita 187-paĝa poŝlibro troviĝas, krom la adresoj kaj aliaj informoj pri la gastigantoj, ankaŭ mapoj kun indikoj pri ĉiuj lokoj kun gastigantoj, tiel ke eblas facile plani sian vojaĝon. Enestas ankaŭ reguloj kaj konsiloj pri la uzo de la servo, aliaj utilaj adresoj kaj fragmentoj el la vojaĝrakonto de Amanda Higley el Usono kiu dum pli ol unu jaro en 1999 kaj 2000 vagadis tra Eŭropo.

Per Pasporta Servo vojaĝantaj esperantistoj, kiu membras en ĝi, rajtas je senpaga tranoktado ĉe la gastigan-

toj. Membro de Pasporta Servo estas ĉiu kiu posedas la adreslibron. Gastigantoj ricevas la libron senpage, aliaj povas aĉeti ĝin.

La ideon pri Pasporta Servo, tiam sub la nomo Programo Pasporto, prezentis la argentinano Ruben Feldman Gonzalez en 1966. La unua adresaro laŭ la nuna sistemo aperis en 1974 sub la gvido de Jeanne-Marie Casx el Francio.

Ambaŭ pioniroj troviĝas inter la gastigantoj ankaŭ en la plej nova eldono, kies amplekso fariĝis jam 27-obla kompare kun la unua listo de 40 adresoj. La administranto de tiu ĉi servo de TEJO estas Derk Ederveen el Nederlando. La adresaro estas aĉetebla ĉe la libroservo de UEA. La prezo estas 10,90 eŭroj plus afranko (plus imposto de 6% en EU). Ekde 3 ekz. oni ricevas trionan rabaton.

Centra Oficejo de UEA

La Dua Internacia Fotokonkurso

"La Ondo de Esperanto" kaj Urala Esperantista Societo (UES), post la sukceso en 1998, organizis en 1999 la duan internacian fotokonkurson. La konkurso ne estis ligita al deviga temo. En la konkurso partoprenis 43 fotoverkoj de 17 aŭtoroj el 11 landoj: Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Francio, Germanio, Hungario, Jugoslavio, Kroatio, Ruslando, Ukrainio, Urugvajo. (Pasintjare estis 42 fotoj de 15 personoj el 9 landoj.) 18 januaro 2000 kvarpersona juĝkomisiono anoncis la rezulton.

1a premio (du minimumaj ruslandaj monataj salajroj kaj abono al "La Ondo de Esperanto"): Sandra Burgués Roca (Urugvajo) pro "Konstruante novan homon".

2a premio (unu minimuma ruslanda monata salajro kaj abono al "La Ondo de Esperanto"): Andrea Ottrok (Hungario) pro "Super la nuboj".

3a premio (abono al "La Ondo de Esperanto"): Harri Melasniemi (Finnlando) pro "Eta arbo".

Redakcio de LOdE,
Komitato de UES
RU-620014, Jekaterinburg-14,
p.k. 162, Ruslando
Telefono: (3432) 281711
sezonoj@mail.ru
http://www.sezonoj.itgo.com



Kampanjo por la Manifesto 2000 de Unesko

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 2000-an "Internacia Jaro por la Kulturo de Paco". Unesko ricevis la taskon zorgi por ke la jaro iĝu okazo por pripensado kaj agado favore al Kulturo de Paco. Grupo da Nobel-pacpremiitoj projektis Manifeston okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. La kampanjo ĉirkaŭ ĝi celas kolekti 100 milionojn da subskriboj prezentotaj al la Ĝenerala Asembleo de UN dum venonta septembro. La Manifesto 2000, aperigita de Unesko en kelkaj lingvoj, estas nun aperigita en Esperanto de UEA. La subskriboj de esperantistoj (aŭ kolektitaj de esper-antistoj) estos registritaj en aparta fakdo de la komputila inform-banko ĉe Unesko. Tial ni havas ŝancon (montri kiom esperantistoj subtenas aktua-lajn kampanjojn por pli bona mondo) sed ankaŭ riskon (se la partopreno de esperantistoj estos tro malgranda). Pro tio ni apelacias al vi por ke vi:

- Petu ĉe UEA rete uea@inter.nl.net aŭ per normala poŝto (Nieuwe Binneweg, 176 NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando) ekzemplerojn de la Manifesto 2000. Ĝi estas tre bele presita (mi kuraĝas diri ke malofte mi vidis tiel belan informilon dum la lastaj jaroj); en kluboj, konversaciaj rondoj kaj aliaj okazoj oni legu la tekston kaj diskutu pri ĝi. Por pli vasta traktado de la temoj de la Manifesto bonege taŭgas la libroj "Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj" kaj "Paĉjo, kio estas rasismo?" mendeblaj ĉe UEA.
- Subskribu kaj kolektu subskribojn. En la faldfolio mem estas spaco nur por unu subskribo, sed vi rajtas fotokopii la subskrib-folion tiom da fojoj kiom vi bezonas, kaj

vi rajtas ankaŭ simple kolekti la subskribojn (kun ĉiuj indikitaj informoj pri la subskribintoj) en aparta normala, blanka folio. Vi rajtas ankaŭ simple subskribi kaj subskribigi rete ĉe "www.uea.org/2000.html". ATENTU: VI RAJTAS KOLEKTI KAJ RESENE PAPERESUBSKRIBOJN ANKAŬ DE NEESPERANTISTOJ. Ĉar la Manifesto estas mallonga, ĉiu sendube povos facile traduki ĝin aŭ la esencon al sia nacia lingvo por neesperantistoj.

- Sendu la surpajere kolektitajn subskribojn al UEA. UEA mem zorgos por ke ili estu enmetataj en la komputilon de Unesko. Se vi subskribas rete, la tuta afero okazos aŭtomate, kaj vi ne devas fari ion alian. Pro la grandega celo de ĉi tiu kampanjo, kaj pro la fakto ke la agado de esperantistoj estos senkompatate klara, mi certas ke vi ĉiuj faros vian ebilon por montri al la mondo, ke Esperanto estas nepre atentinda parto de la Kulturo de Paco kaj ke esperantistoj estas nepre atentinda parto de la monda pacamanta socio. Dankon kaj tre amikajn salutojn.

Renato Corsetti
vicprezidanto, UEA

(El ret-info Retpoŝta Esperanto-novajservo:
<http://www.esperanto.hu/ret-info.htm>)

Malferma tago

La Centra Oficejo de UEA en Roterdamo invitas al sia Malferma Tago, kiu okazos sabate, la 13-an de majo. La ĉefgasto de la 12-a Malferma Tago estos la konata movada aganto, eseisto kaj oratoro Gian Carlo Fighiera el Italio. Post oficejo de Konstanta Kongresa Sekretario de UEA (1956-1961) Fighiera faris longan karieron en la internacia turismo kaj kongresorganizado, fine kiel altranga oficisto de Monda Turisma Organizo. Sian multflankan movadan aktivadon li daŭrigis i.a. kiel prezidanto de la eldona societo "Heroldo de Esperanto" ekde 1961, estrarano de UEA kaj en aliaj taskoj. En la Malferma Tago li prelegos pri "La obstakloj kaj ŝancoj survoje de Esperanto en la nova jar-milo". Ankaŭ ĉi-foje ne mankos senpaga loterio, bazaro de esperantajhoj, montrado de Esperanto-filmoj, kafumado kaj teumado. Kiel kutime, la libroservo regalos siajn klientojn per rabatitaj prezoj.

UEA
(El Evento)

Sukcesa kunlaboro de AIS kaj E-organizaĵoj

Estis la 16a Internacia Festivalo (IF) kaj la 12a germana studadesio de AIS San-Marino, sed samtempe la unua komuna aranĝo: Sojle al la jaro 2000 la germana urbo Muenster gastigis festivalon, en kies kadro do-centoj de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) lekciis kaj diskutigis pri jenaj temoj:

- Aplikado de aŭdvidaj kaj plurkanalaj rimedoj en instruado (Hans-Dietrich Quednau)
- La rolo de virinoj en socio, familio kaj politiko (Alicja Lewanderska-Quednau)
- Stacioj de la eŭropa ideo (Dirk Willkommen)
- La rebaptistoj en Muenster: ĉielo kaj infero (H. Fischer)
- La germana kulturo sub la premo de la usona prestiĝo (R. Fischer)
- La suneklipso / La misteroj de Marso (Amri Wandel)

Pli ol 30 festivalanoj utiligis la okazon akiri ateston de AIS, kiu povas esti bela memoraĵo, sed ankaŭ pruvilo ĉe aliaj universitatoj aŭ eĉ por posta studado ĉe AIS. La koncepto kombini Esperanto-aranĝon kun AIS-konferenco denove pruvigis sukceson. Jam pluraj Internaciaj Kongresaj Universitatoj (IKU) de UEA profitis de AIS-kursoj, kaj prof. Wandel, rektoro de la sekvanta IKU en Tel-Avivo, jam esprimis sian esperon, ke ankaŭ tie kontribuos AIS-docentoj. Same la organizantoj de la lastjara Internacia Junulara Festivalo (IJF) en la itala urbo Bellaria proponis al AIS ripeton de la kunlaboro, tiel ke ankaŭ la ĉi-jara IJF en Cavallino (venecia marbordo) ofertas AIS-kursojn kadre de sia temo "Ĉu esti aŭ ne esti eŭropano?". Kvankam AIS nun ŝvite organizas sian novan (grandparte reelektitan) senaton, ĝi ne limigos sin kontribui pri Esperanto-aranĝoj: Pentekoste kaj aŭtune ĝi okazigos la aranĝojn SUS 22 kaj SUS 23 en Hradec Kralove (Ĉeĥio) kaj Sibiu (Rumanio). En aprilo la meksikia AIS-organizo festos sian ekeston per tritaga inaŭguro en la urbo Celaya. Festprelegos famaj esperantistaj kaj neesperantistaj sciencistoj el diversaj amerikaj kaj eŭropaj landoj.

Reinhard Fossmeier
inform-oficejo de AIS San-Marino
<refo@ais.m.shuttle.de>

www.forst.tu-muenchen.de/OTHERS/AIS

Denove antaŭ la kameraoj

DONACOJ

MEMORE DE JAN STRÖNNE

Ann-Kristin kaj Bengt Krondal; Familio Strönne; Gertrud kaj Torsten Lund, Malmö; Inez kaj Lennart Lagerkrantz, Falun; Lisbet kaj Bertil Andreasson, Hörby; Gulli Svensson, Malmö sume 2.900 kr

RONDO LANGLET

Wim Posthuma, Västerås 100 kr

CETERA DONACO

Leif Nordenstorm, Boden 300 kr

SEF kore dankas por la donacoj. Novaj donacoj estas bonvenaj al poŝtĝirkonto de SEF 2012-3. Ankaŭ regulaj donacoj en Rondo Langlet oni povas aranĝi per poŝtĝiro. SEF tute dependas de donacoj.

Membrokotizoj tute ne sufiĉas por la agado kaj kostoj de La Espero kaj Esperanto-Centro.

Aperis antaŭ la televidaj kameraoj S-ro Juan Ramón Rodríguez, Ĝenerala Sekretario de Kuba Esperanto-Asocio, denove kiel gasto de la populara, tagmeza televidprogramo TeVeré. Tiu naciatinga programo, kies nomo estas vortludo pri la literoj TV - televido - kaj la esprimo "mi vin vidos", estas tre populara kaj ŝatata, ĉar krom anonci la programojn de la tago, ĉiam prezentas interesajn temojn pri kulturo, medicino, asocioj, ktp ...

Tri estis la temoj tuŝitaj de S-ro Rodríguez: ... kaj la asocia partopreno en la 10-a Internacia Konferenco pri Lingvistiko kaj Literaturo en Santiago de Kubo. Li vigligis siajn vortojn per montrado de fotoj. S-ro Rodríguez estis la reprezentanto de KEA en la Konferenco, per prelego kun titolo: "Esperanto: Filozofa Filologio aŭ Filozofio Filologa?". La prelego, kiu meritis al li unu el la premioj, estos eldonita de la Universitato de Oriente ...

Alberto García Fumero
(El Eventoj)

Kion fari por la familio Ngangu ?

Nduantoni Bakidila Ngangu estis jam de la jaroj 70 vera kolono de Esperanto en Zairio. Li forferis multon por ĝi kaj estis eĉ malliberigita pro ĝi. Pluraj el liaj infanoj estas esperantistoj. Pasintjare mortis unu el ili, Philemon, nur 25-jara. Nun la tuta familio estas en ekstreme mizera situacio. Estus ege maljuste se ili estus forlasitaj post tiom da forfero. La patro ne plu havas hejman adreson. Supozeble li estas nun en Kinŝaso, kun siaj filoj Moliere kaj Henri, mem senhejmaj sed kun adreso kiun mi povas havigi al helpopretaj personoj. Henri Masson : <esperohm@club-internet.fr>

(El NUN)

La japanoj kaj Esperanto

En Yomiuri-ŝinbun, la plej kvanta ĵurnalo en Japanio (kaj eble mondo) kun 10.500.000 ekz. tage, la 29-an de januaro aperis artikolo de s-ro Moyosi Etuo, prezidanto de la kompanio Swanee (Swany), ganto-fabrikanto pri lingvaj problemoj de japanoj kaj Esperanto kiel taŭga solvo.

La E-traduko de la artikolo aperis en "Bulteno de Tyugoku kaj Sikoku" n-ro 30, aŭ estas havebla de la redaktoro Kosaka Kiyoyuki. Rete: kiyoyuki.kosaka@ma2.seikyoku.ne.jp

501 studentoj lernas Esperanton

501 universitataj studentoj klasaniĝis al Esperanto-leciono, kiu okazis en la Universitato Dankook en Seulo, Koreio. La unua semestra kurso daŭros dum 4 monatoj (Lee Jung-kee docentas). Tiuj, kiuj volas korespondi kun ili, bv. turni vin al jena adreso. Retadreso: esperant@unitel.co.kr Hejmpaĝo: www.esperanto.co.kr

(El NUN)

Esperanto por internaciaj kontaktoj inter spiritistoj

De Sylla Chaves venas la informo, ke antaŭ nelonge CEI (Conselho Espirita Internacional = Internacia Spiritisma Konsilantaro) decidis adopti Esperanton kiel ĉefan lingvon por siaj internaciaj rilatoj. La enkonduko estos iompost-ioma, ĝis la jaro 2004, kiam granda internacia spiritisma renkontiĝo okazos en Francio.

Ĝis nun CEI uzis ĉefe la portugalan lingvon, ĉar pli ol duono el la mondaj spiritistoj estas portugallingvanoj. La rapida plimultiĝo de alilingvaj spiritistoj postulas nun, ke CEI fariĝu plurlingva aŭ adoptu la solvon uzi neŭtralan internacian lingvon.

(El NUN: www.esperanto.se/nun/)

Komisiono por agado en Oceanio

En la lastaj jaroj UEA sisteme evoluigis sian agadon en diversaj mondopartoj laŭ la principo, ke iliajn specifajn problemojn kaj cirkonstancojn plej bone konas lokaj aktivuloj. Sekve la Estraro de UEA nomumis specialajn komisionojn por mondopartoj, kies tasko estas kunordigi disvastigon de Esperanto kaj la agadon de jam ekzistantaj Esperanto-organizaĵoj, kaj konsili la Estraron de UEA.

La komisionoj konsistas plejparte aŭ tute el esperantistoj de la koncerna mondoparto. Ĝis nun funkciis komisionoj por Afriko, Ameriko, Azio kaj arabaj landoj. Kiel kvina aldoniĝis al ili ĵus Oceanio Komisiono, kun Brian Fox el Nov-Zelando kiel kunordiganto. Aliaj membroj estas Rosalie Schultz, Dietrich Weidmann, Kep Enderby kaj Renato Corsetti.

La adreso de la kunordiganto estas: Brian Fox, 634 South Titrangi Road, Auckland 1007, Nov-Zelando. Ĉiu kiu havas intereson pri disvastigo de Esperanto en la pacifika regiono, aŭ havas indikojn pri esperantistoj loĝantaj tie, bv. kontakti la komisionon. Krom poŝte, eblas kontakti ĝin ankaŭ rete per oceanio@egroups.com.

UEA
(El Eventoj)

Dankon

al ĉiuj vi karaj geamikoj, kiuj per varmaj vortoj, leteroj, floroj, donacoj al la esperantomovado kaj al bonfaraj organizoj montris vian kunsenton en nia profunda funebro okaze de la morto de nia amata

Jan Börje Strönne

Varman dankon ankaŭ al ĉiuj, kiuj honoris la entombigan ceremonion per ĉesto, kaj pro la multaj belaj floranĝoj tie.

Sincere kaj elkore viaj
Anna-Greta, Ulla kaj Ann-Marie

Revuo pri esperantologio

"Esperantologio-Esperanto Studies", EES nomiĝas nova revuo pri esperantologio, aperanta ekde la somero 1999. Ĝia redaktoro estas prof. Christer Kiselman, vicprezidanto de AdE. En la redaktaro partorenas akademianoj kaj e-ologoj.

EES estas internacia revuo pri ĉiuj fenomenoj rilatantaj al E-o. Ĝi daŭrigas tradicion de samnoma revuo, eldonita inter 1949-1961 de Paul Nergaard.

EES aperigas artikolojn bazitajn sur originalaj studoj pri lingvosciencaj, historiaj, literatursciencaj, psikologiaj, politikaj aspektoj de E-o. Por konservi la altan nivelon de la revuo ĉiu artikolo estas submetata al du spertuloj, kiuj esprimas sian opinion pri la taŭgeco de la artikolo.

EES aperas almenaŭ unufoje jare, ĝi legeblas kaj surpapere kiel revuo, eldonita de Bambu Ltd, Varna (Sabira Ståhlberg) kaj en interreto ĉe la adreso <http://www.math.uu.se/esperanto>

EES estas mendebla ĉe Bambu Ltd kaj vendiĝas jam en E-libroservoj. Ĝi kostas 22 EUR por individuoj kaj 33 EUR por institucioj.

Por mendoj kontaktu: Bambu Ltd, Pk. 405, BG-9000 Varna, Bulgario. rete: bambu@mailroom.com, por artikoloj kaj enhavaj demandoj:

Christer Kiselman

Upsala Universitato, Pk. 480, SE-75106 Uppsala, Svedio
Rete: kiselman@math.uu.se

Korea Antologio de Noveloj

Jen ebleco por ni konatiĝi kun korea literaturo, kiu estas malmulte konata en Svedio. Tiu pruvas la utilon de Esperanto. La 339-paĝa libro kun 26 noveloj de 1922 ĝis 1978 estas tre altkvalita.

Kelkaj noveloj estas mallongaj Ĉeĥov-eskaj humuraĵoj aŭ tragedioj, aŭ eĉ humuraj tragedioj, ekz. "Fotografajo" pri instruisto kiu ricevas fotografajon kun du klasaninoj. Li tondas ĝin kaj ŝparas nur la bildon de la plej ŝatata. Kio okazas post kelka tempo, kiam la knabinoj vizitas la instruiston, kaj komencas foliumi lian albumon? Por ekscii tion, vi devos legi la antologion!

Aliaj noveloj estas kelkdekpaĝaj pentraĵoj pri la ĝojoj kaj malĝojoj de la popolo. La korea historio dum la pasinta jarcento enhavas grandajn kontrastojn: vivoj de malriĉuloj en la kamparo; japana politika subpremo; Korea Milito, rapida ekonomia kresko. Rapidaj ŝanĝiĝoj konas multajn interesajn tempojn al la verkistoj.

La lingvaĵo de la noveloj estas ĝenerale tre bona. Mi volas gratuli al ĉiuj nekoreoj, kiuj nun povas konatiĝi kun korea literaturo, kaj danki al Korea Esperanto-Asocio, kiu eldonis la libron.

Leif Nordenstorm

Låna böcker

Vi får in nya esperantoböcker varje år till stadsbiblioteket. Nu har vi 690 böcker ... Det finns en lista i informationsdisken om våra böcker, men du kan även från din dator söka rätt på våra esperanto-böcker. Vår adress är <http://www.stadsbiblioteket.goteborg.se>

Klicka på "Sök i vår katalog"-länken och skriv in ordet "esperanto" eller bokens titel/författare.

Esperantomusik

Lyssna på esperantomusik! På avd. 1 kan du välja på 12 olika kassetter, som du kan lyssna på i biblioteket. De är inte till hemlån. Bibliotekarien hjälper dig att hitta dem och det finns en liten katalog som man kan välja ur.

Tidningar

Läs tidningar! Det finns två tidningar; La Espero och Monato som finns i läshörnan mellan engelska och tyska böcker på avd. 5.

Boktips

Några boktips: Conan Doyle, A.: La ĉashundo de la Baskerviloj (en Sherlock Holmes-deckare); Djura: Vualo de l' silento (roman av en algerisk kvinna); García Márquez, G.: Cent jaroj da soleco (känd roman från Sydamerika); Janson, Tove: Mumin-valo (Mumindalen); Simenon, G.: Maigret hezitas (en Maigret-deckare); Strugatskij, Arkadij & Boris: Pikniko ĉe vojrandoj (en science fiction-roman av ryskt snitt).

Inga Johanson
(Ur Inter-ligilo 1/00)

Nova libro pri lingva genocido

Publikigis nova libro en la angla kun la titolo Lingva genocido en la edukado - aŭ tutmonda diverseco kaj homaj rajtoj? (En la angla Linguistic Genocide in Education - or World-wide Diversity and Human Rights?). La

aŭtoro estas Tove Skutnabb-Kangas. Laŭ la verkinto ni nun riskas ekstermi pli ol 90% de la parolataj lingvoj en la sekvantaj 100 jaroj. Ŝi mencias teoriojn pri la reciproka dependeco de kultura diverseco kaj biodiverseco. La mediana nombro da parolantoj de lingvoj estas nur ĉ. 5.000. En la kvara ĉapitro la aŭtoro ankaŭ dediĉas spacon al Esperanto. Evidentiĝas en la teksto la rilatoj inter potenco kaj lingvaj demandoj.

(Aĉetebla je 55 dolaroj ĉe: orders@eurospan.co.uk ISBN 0-8058-3468-0)

Libreto pri "Valdemar Langlet - ĉu forgesita heroo?"

Ĝus aperis en Katrineholm libreto pri Valdemar Langlet. La unua versio estas en la sveda. Kostas nur 30 kr + sendokosto 10 kr. Mendu ĉe: vskg@spray.se aŭ agneta.emanuelsson@esperanto.nu

(EINUN)

KEF 2000

Kultura Esperanto-Festivalo 2000
17.-23.7.2000
Helsinki
Finlando

Programeroj

Muziko

Koncertoj: Persone (akustika kaj elektra), Dolĉamar, Esperanto Des-perado, Stomakoj, Jomart kaj Nataŝa, Subĉiela koncertserio en la helsinka urbocentro; Prelegoj: Historio kaj evoluo de esperanta muziko (Martorell), Esperanta rokliriko (Camacho); Kantemula rondo

Teatro

Premieroj: la grupo "Ibere libere", la grupo "Variantoj"; Prelego: Historio de esperanta teatro (Arosjev); Kurso: Amatora teatra grupo (Arosjev)

Sendu salutojn kaj gratulojn bildograme

Ĉe esperanto.nu ekfunkciis nova servo, kiu ebligas sendon de salutoj kaj gratuloj al gekonatoj per esperantaj bildkartoj. Ĝi havas la nomon Bildogramo kaj proponas proksimume 100 malsamajn bildojn por diversaj okazoj. Ĉiu bildo surhavas saluton aŭ alian tekston en esperanto. Bildogramo troveblas ĉe <http://esperanto.nu/bildogramo/>

(EINUN)

Iom pli rapide
ol per guto
malgranda...



Sincerajn salutojn
al la legantoj de
La Espero.

Red.

Literaturo

Prezentoj: Jorge Camacho, Liven Dek, Miguel Fernández, Goncalo Neves, Sabira Ståhlberg, Antonio Valén, Mao Zifu; Prelegoj: La iberia skolo (Valén), Verkisto Karolo Piĉ (Neves), Esperanta sciencfikcio (Dek); Verkataliero (Camacho), Laborgrupo por infanrakontemuloj (Neves), Legorondo; Spektakloj: García Lorca (Fernández), Vespero de esperanta ampoemo

Komikso

Ekspozicio pri originale esperanta komikso; Prelego: esperanta komikso (Torras/Camacho); Kurso: komiksdesegnado (Torras)

Danco

Dancospektaklo (Henriksen); Plene esperanta diskejo (Martorell)

Debatoj kaj diskutoj

Debato pri "literaturaj vortoj" (Camacho/Lindstedt)

KEFejo urbocentre

Kultura Esperanto Festivalo 2000 okazos rekte en la urbocentro de Helsinki, en Kaisaniemi. Pli centre ne plu eblas, la nova KEFejo estas en tuja proksimeco de la stacidomo (3 minutoj piede), haveno (10 minutoj piede), la Senata Placo kaj la helsinka universitato.

La aranĝoj okazos en du apudaj ejoj: Kulturcentro Caisa (prononcu Kajsa, adreso Kaisaniemikatu 6B) kaj lernejo Kaisaniemen ala-aste (Puutarhakatu 1). Eblos tranoktado amasloĝeja, memzorganteco, samkiel tranoktado en diversnivela hoteloj. Ni faris tre favorprezan kontrakton kun la restoracio de Caisa, pro tio ni ne rekomendas memzorgantecon. Notu ankaŭ ke se vi kunportas multe da manĝaĵoj, la finna dogano povas konfiski tion. Amasloĝejo troviĝas en la menciita lernejo. Por tiuj kiuj volas pli altnivelan loĝadon, ni rezervis lokojn en du hoteloj: Hotelo Arthur, kiu situas en la sama kvartalo kiel la KEFejo kaj Eŭrohostel, kiu situas je unu-kilometra distanco.

Caisa estas internacia kulturcentro en la mezo de Helsinki. Ĝia celo estas subteni kreigon de multkultura urbo antaŭenigante la interagadon de homoj venintaj el diversaj landoj, donante informojn pri diversaj kulturoj kaj pri la finna socio.

Aliĝo

Vi povas aliĝi al KEF 2000 laŭ du manieroj:

1. Plenu paperan aliĝilon kaj

sendu ĝin al la indikita adreso. Pagu samtempe la kotizon al la konto kiun vi elektis.

2. Aliĝu rete:

<http://www.esperanto.fi/kef2000>

Pagu samtempe la kotizon al la konto kiun vi elektis. Konto de FEJO en Finnlando ĉe Merita Pankki 101130 - 220698 (aldonante 10 eŭrojn el ekster Finnlando). Al la konto de KEF 2000 ĉe UEA (kefe-r).

	-2000 05 31	2000 06 01-
Junulo	144	178
Plenkreskulo	178	216
Infano	89	108

Infanoj naskiĝintaj 1997 01 01 aŭ poste aliĝas senpage; infanoj naskiĝintaj inter 1986 01 01 kaj 1996 12 31 (inkluzive) pagas 50 % de la plenkreskula kotizo.

Junuloj estas tiuj kiuj naskiĝis inter 1970 01 01 kaj 1985 12 31 (inkluzive).

Memzorgantoj (programo kaj loĝado, sed ne manĝaĵoj) rajtas al rabato de 30 eŭroj.

Se vi deziras hotelon, indiku en kiu hotelo, kiuj datoj, kia ĉambro kaj kun kiu vi deziras loĝi.

Krome

Ĉiu aliĝanto, ankaŭ artisto kaj infano, plenu apartan aliĝilon. Kiam via aliĝo estas en ordo, vi ricevos poŝte skriban konfirmilon, kiun vi devas kunporti al KEF.

Ĉiuj kotizoj inkluzivas plenan pensionon (tri manĝojn tage ekde lunda tagmanĝo ĝis dimanĉa matenmanĝo, entute 18 manĝojn) kaj tranoktadon en lerneja klasĉambro kun matracoj. Portu proprajn littukojn kaj kovrilon aŭ dormosakon.

Hotelaj ĉambroj: Limigita kvanto da hotelaj ĉambroj estas haveblaj kontraŭ krompago.

Hotel Arthur, Vuorikatu 19, tuj apud la KEFejo: 1-persona ĉambro 71 eŭroj, 2-pers. ĉambro 42 eŭroj, kromlito 17 eŭroj, matenmanĝo en hotelo. Eŭrohostel, Linnankatu 9, je unu-kilometra distanco: 1-pers. ĉambro 31 eŭroj, 2 aŭ 3-pers. ĉambro 18 eŭroj, matenmanĝo en KEFejo.

Ĉiuj prezoj po persono por unu nokto, sen devigo. Se vi deziras hotelan ĉambro, bv. antaŭkonsulti nin retpoŝte (kef2000@esperanto.fi) pri la havebleco kaj ekzakta prezo.

Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kultura Esperanto-Festivalo 2000

Siltasaarenkatu 15 C 65
FIN-00530 Helsinki
Finlando

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Konkurso de videofilmoj

La 4-a Festivalo de Videofilmoj en Esperanto okazos **la 8-an de junio 2000 en Maribor, Slovenio**. Dum la festivalo estos konkurso de videofilmoj faritaj de esperantisto-verkistoj. Eblas konkursi en du kategorioj, ili estas: arta filmo kaj dokumenta filmo. La aŭtoroj devas sendi ĝis fino de junio kopion de siaj verkoj en videokasedoj en VHS-formato (la plej ofte uzata sistemo en Eŭropo). Bonvolu skribu sur la letero depende de la kategorio: "arta sekcio" aŭ "dokumenta sekcio". La artaj filmoj ne estu pli longaj ol 10 minutoj. La dokumentaj filmoj ne povas esti pli longaj ol 15 minutoj. Informoj haveblas kaj kasedoj estas atendataj ĉe la adreso:

Esperanto-societo Maribor
Besednjakova 1
SI-62000 Maribor
Slovenio

Internacia Esperanto-Feriado

La kvina Internacia Esperanto-Feriado kun folkloro **en la montaro Pieni** okazos **de la 1-a ĝis la 15-a de septembro 2000**. La montaro Pieni (apud la pola-slovaka landlimo) kun ĝiaj blank-argentaj kalkŝtonegoj, verdaj arbaroj, breĉo de la rivero Dunajec, raraj plantoj kaj bestoj, estas konsiderata kiel unu el la plej pitoreskaj lokoj en la mondo. Ĝiajn pejzaĝojn oni uzas en filmoj kiel paradizajn scenojn.

Multaj el la loĝantoj - afablaj kaj gajaj montaranoj - estas esperantistoj. Nia urbeto estas nomita jam antaŭ longa tempo "Esperanta urbeto".

Ni aldonu, ke preskaŭ ĉiu ĉi tie estas artisto: kantisto, dancisto, muzikisto aŭ produktanto de popolaj artobjektoj (ekz. ledaj ŝuoj, mansakoj, lignaj artaĵoj); estas ankaŭ violonfaristoj, brodistinoj k.t.p.

El la programo:

- vizitoj de la antikvaĵoj en la urbe
- ekskursoj en la montaro
- flosado sur la rivero Dunajec
- aŭtobusaj vizitoj (proprakte) en Zakopane, Krakovo, Wieliczka (salminejo), Krynica kaj Szczawnica (famaĵ kuraĉlokoj)
- folkloraj prezentadoj, lokaj tradicioj, rostado de manĝaĵoj
- esperantaj kursoj

Aliĝkoto: 250 USD (aŭ egalvalore) por luksa ripozdomo (2 - 3 - litaj ĉambroj), 3 manĝoj tage kaj programo dum 2 semajnoj.

Aliĝo: Ĝis komence de junio 2000 al Polski Związek Esperantystów S-ino Stanisława Majerczak ul. Kingi 6
34-450 Kroscienko n.D.
Pollando
tel. 00-48-18-262 31 48

Ĉebalta printempo

La 22-a Ĉebalta Esperantista Printempo okazos **inter la 30-a de majo kaj 11-a de junio 2000 en Mielno, Polio**. La partoprenantojn atendas multaj belegaj ekskursoj en la vidinda ĉirkaŭaĵo. Okazos diversaj interesaj prelegoj kun videofilmoj, promenadoj, ludoj kun valoraj premioj, danado, ktp. Antaŭvideble kreskos esperantega etoso. Kontakt- kaj aliĝadreso:

Filio de Pola Esperanto-Asocio
skr. 30. PL-75016 Koszalin
Polio

BET-36

La 36-aj Baltaj Esperanto-Tagoj okazos **en Tallinn en Estonio inter la 2-a kaj la 8-a de julio**.

Programo: Interkona vespero, solena malfermo, preskonferenco, Somera Universitato, E-kursoj, libera tribunio, libroservo, videofilmoj, vesperaj aranĝoj, Diservo, ekskursoj.

Loĝado:

- 1) Hotelo ĉ. 400-500 EEK (1 EEK = ĉ. 0,58 SEK) tagnokte.
- 2) Komunloĝejo 2-lita ĉambro 110 EEK tagnokte, 4-lita 70 EEK.
- 3) Sport-gimnazio 4-6-lita ĉambro 40 EEK tagnokte.

Manĝado: En gimnazia manĝejo laŭ mendoj.

Aliĝo: Plenigu aliĝilon kaj sendu al suba adreso.

Aliĝkoto: Ĝis la 15-a de majo 21 USD, por lernantoj ĝis (inkluzive) 15-jaraj senpage, pli aĝaj lernantoj, studentoj kaj handikapuloj 10,50 USD. Post la 15-a de majo la aliĝkoto estas duobla.

Kontakt- kaj aliĝadreso:

s-ino Helju Lainjärv
str. Kõo 21-2
113 11 Tallinn
Estonio

KRUCVORTA ENIGMO

SOLVO DE 99/5-6

	A	B	C	D	E	F	G	H	I
1	E	S	T	I	■	P	U	N	I
2	S	K	A	N	D	I	N	A	V
3	T	A	K	T	I	K	O	■	A
4	A	R	T	E	R	O	■	K	N
5	N	L	■	R	I	N	O	C	E
6	T	A	L	E	N	T	E	■	T
7	A	T	E	S	T	A	R	O	■
8	J	I	D	A	■	J	A	V	O
9	■	N	A	N	A	■	A	M	I
10	A	M	■	S	T	A	N	B	R
11	N	A	P	■	T	I	E	■	R
12	K	L	A	P	■	M	A	R	G
13	A	S	T	R	O	■	K	O	L
14	R	A	R	A	N	K	A	J	A
15	S	O	N	I	■	O	N	T	A
16	■	U	N	O	■	A	L	N	O
17	A	L	M	O	Z	P	E	T	A
18	T	O	L	O	■	A	T	E	N